
Turangis 22 Tuko

2-a trimestro 2011



En tiu numero vi legos..

Ofte oni diras ke Gutenberg inventis libropresadon, D. Baron precizigas, kio estis lian inventaĵon.	p.1
La tendema vojaĝo de J.-J. Moreau daŭras tra Rusio .	p.2 ĝis p.5
Denise kaj J-Louis Le Brizault partoprenis en Internacia Himalaja Renkontiĝo, ili rakontas.	p.5 ĝis p.8
La eksa urbestro de Tours mortis antaŭ 3 semajnoj. André Aude memoras, kion li faris por nia esperantista grupo .	p.5

Johannes Gutenberg

Sekve al nia Zamenhofa Tago de la 12a de Decembro 2010, kiam ni vizitis la muzeon de tipografio, jen teksto pri Gutenberg.

Li naskiĝis inter 1395 kaj 1405 en la germana urbo Majenco, kiel filo de la komercisto Friel Gensfleisch (pluan nomon 'zum Gutenberg' lia patro aldonis laŭ tiama modo pro loko, kie vivis la familio poste). Li mortis la 3an de Februaro 1468 en Majenco.



La ĉefa invento de Gutenberg ne estis, kiel oni foje erare opinias, libropresado. Ĝi ekzistis jam antaŭ li. Kontraste al la antaŭa bloktipa presado, laŭ kiu, por ĉiu unuopa paĝo, estis forĝita aŭ skulptita metala aŭ ligna kompleto, Gutenberg kunmetis paĝon el unuopaj presotipoj (literoj, ciferoj kaj signoj), kiuj estis ŝanĝeblaj kaj reuzeblaj por alia paĝo. Tio rapidigis la presadon kaj ŝparis kostojn. Fakte la ideo jam ekzistis antaŭe, sed Gutenberg sukcesis teknike perfektigi la procezon kaj krei tipojn rapide kaj facile realigeblajn. La inventaĵo de Gutenberg ebligis presi grandegan kvanton de tutaj libroj en grandaj serioj kaj per tio informan kaj sciencan revolucion kaj disvastigon de klereco inter pli multaj socitavoloj.

De 1334 ĝis 1344 Gutenberg laboris en Strasburgo kiel oraĵisto kaj skribisto kaj tie fondis kun aliaj la entrepenon 'Aventur und Kunst' (aventuro kaj metia arto). Tie li estis helpata de la oraĵisto Hans Dunne kaj konstruigas presilon kun la helpo de la lignotornisto Konrad Saspach. Per la jam ekzistanta tekniko de la patricogravuro, konata de la oraĵistoj kaj librobindistoj, Gutenberg inventis muldilon por moveblaj literoj el plumbo fandeblaj post uzo. La unua presita libro laŭ tiu tekniko estas la latina gramatiko de Donato en 1451. Reveninte al Majenco, la 23an de Februaro 1455, li komencis amasan presadon de la t.n. Biblio de Gutenberg, la unua biblio, kiu aperis en la mondo en granda serio. Nuntempe en la

mondo ankoraŭ ekzistas 60 Biblio de Gutenberg. En 1454 li presas 'la turkan kalendaron', kiu estas la unua politika presaĵo kaj la unua presita kalendaro.

Iuj historiistoj pensas, ke la nederlandano Laurens Janszoon Coster (Haarlem ĉ. 1370-1440) estas la unua eŭropano, kiu inventis moveblajn presliterojn. Tamen estas preskaŭ certa, ke Gutenberg estis kelkaj jaroj pli frue ol Coster.

Laŭ la legendo, Coster hazarde faris sian inventon, kiam li en parko tranĉis pecojn de arbŝelo en formo de literoj, kiuj je tiu momento falis teren kaj postlasis premsignojn en la sablo.

Dominique Baron

■ ● ■ ● ■ ● ■ ●

PERIPLO TRA LA BALTAJ LANDOJ
(sekvo)

Antaŭ ol trapasi la landlimon, ni tranoktas en la hotelo « King » en la urbo NARVA, Rusio situas aliflanke. Sur la ponto transpasanta la riveron Narva-n, kiu apartigas la du landojn, ni renkontas multajn ebriulojn, eĉ junulinojn. La doganistoj estas superŝutitaj per ili. Alkoholismo estas rikura, ŝajne la homoj atendas nenion de la vivo, ilia estonteco estas ŝtopita, ili ne scias, kiel plani sin al oso.

Jen Rusio. En la kamparo, meze de nenie, staras ofte domoj, kial do oni konstruis ie ajn ; kion povas fari la loĝantoj sen veturilo, krom enui… kaj drinkaĉi… mi ne aprobas sed mi komprenas ilin.

Ni renkontas malofte bovarojn. Kiam kamparano posedas du bovojn, li estas preskaŭ riĉa… En Francio, kiam li posedas ducent bovojn li estas malriĉa… mi pensas, ke neniam mi komprenos tiun fakton… kial do la francoj plendas ? La kampoj ne estas kulturitaj, ni vidas pli ofte senkulturejojn ol plugaĵoj. Aliflanke dum la komunisma reĝimo en kolĥozoj, la kamparo estis bone plugita kaj zorgita. Nun la eksmaŝinoj, la traktoroj estas disforlasitaj ien ajn… Vivu la libereco !

Post ondumita vojo aperas la urbo PETROVORETS kun la palaco de Petro la Granda. Pli ol mil laboristoj, servutuloj, soldatoj, estritaj de arkitektoj, ĝardenistoj, skulptistoj (la plej kapablaj), hidraŭlikistoj, ade laboregis. La konstruaĵo komenciĝis en la jaro mil sepcent dek kvar. Peterhof estis inaŭgurata en la jaro mil sepcent dudek tri. Kanalo ligas la grandan akvofalon al Golfo de Finnlando. Tiu akvofalo (jaroj mil sepcent dek kvin - mil sepcent dudek kvar) kunportas tridek sep skulptaĵojn el orita bronzo, sesdek kvar fontanojn, cent kvardek du ŝprucfontanojn kiuj malsupreniras de la palacterasoj ĝis la kanalo al la balta maro. Petro la Granda, post sia vizito en Versailles (Francio) decidis tiun konstruaĵon. Inte-



ralie mi citos la ĉambron de la reĝa trono, la relativan sobrecon de ornamaĵoj el stuko kaj marmorstuko, la tapetojn el ruĝa veluro, la pargetojn, kiuj valorigas la portretojn de la imperia familio el Rusio. En la plezurĝardeno staras multegaj palacetoj t.n. « Mia Plezuro », « Marly », « Ermitejo », « Cottage », « La Elspruĉo », « La Fontanoj de Adamo », « de Neptuno », « de la Piramido », « La Romana », k.t.p. Necesas pluraj semajnoj por ekviziti la tuton.

Kiel antaŭvidite, ni alvenas en SANKTA-PETERBURGO-n la dek kvaran de Julio (tagon de nacia festo en Francio). De Petrovorets, ni trairis dek sep kilometrojn en senĉesa trafiko. Laŭvoje staras daĉoj de riĉuloj.


Ni loĝas en milĉambra hotelo, ĝi nomiĝas « Azimuto » kaj situas mezurbe. Kvankam mi sendis retmesaĝon al la ĉefdeligito, mi ricevis neniun respondon. Bedaŭrinde por Esperanto.

Kiel priskribi Sankta-Peterburgon tiel la laga urbo belegas.

Pri la pontaro : en la unua duono de la deka jarcento, la urbo posedis dudek pontojn. Oni nomis ĝin « la muzeo de pontoj ». Iom post iom, oni konstruis multajn pontojn el malsamaj materialoj, ili ornamis kaj ornamas hodiaŭ la riverojn.

Dum la blankaj noktoj, de ĉiam, Sankta-





Peterburganoj kun siaj gastigatoj, ŝategas la levpontojn sur la Nevo (ankaŭ mi). Nun oni kalkulas pli ol okcent pontojn, el kiuj, tricent dek kvin en la historia centro, dudek el ili baskuliĝeblas. La Nevo estas la ĉefa vojo ŝiprebla. Dum la reĝado de Petro la Unua, post la frostoj, oni anoncas la permeson trapasi la Nevon per la trapaso de bufono frapanta tamburon, li estis postsekvata de specialan skipon por ke li ne dronu.

La urbo suferis ofte pro inundoj, ĉefe en la jaroj mil sepcent sepdek sep, mil naŭcent dudek kvar, mil naŭcent kvindek kvin, mil okcent dudek kvar (la plej mortigita). Ĝi suferos verŝajne ankoraŭ pro la forceja efiko… Tial ni bicikladas kiel eble plej.

Staras tro da monumentoj por ke mi priskribu ĉiujn. El ili, mi citas la katedralojn : Sankta-Isaac (la plej bela el ĉiuj) apud la ponto Trinato, Nia Damo de Kazan, Sankta-Petro kaj


Sankta-Isaac

Paŭlo, Sankta-Andreo, Sankta-Nikolao, la kirkojn de Savanto-sur-la-Sango kun siaj bulbaj


Sankta-Petro kaj Paŭlo

tegmentoj oritaj de oraj folioj, de la Reviviĝo, de Armenio.

En Sankta-Peterburgo oni konstruis nur unu moskeon.

La Palacoj multnombras, ĉiu pli bela unu ol la alia. Ĉe pinto de Insulo Vassilevski, staras fiere du rostraj kolonoj, ornamitaj de pruoj, memore pri ŝipaj venkoj.


Borde de Nevo, jen la Palaco Ermitejo, grandega muzeo, kiu entenas milope artistajn ellaboraĵojn. Necesas pluraj jaroj por admiri la mirindaĵojn.

Mi ne kapablas priskribi La Palacon de Vintro, tiel ĝi vastegas, ĉio brilas, spegulas la riĉejojn.

La Palaco de Somero estas la plej malnova konstruaĵo el ŝtono en la urbo. En la dormoĉambro, la litbaldakeno estas kovrita de silko el Ĉinio. La plafono pentrita de artisto prezentas « Morfeo-n », k.t.p.

La fortreso « Petro kaj Paŭlo » staras fiere sur insulo, ĝi simboligas la naskiĝon de Sankta-Peterburgo. Ĝi estis konstruita el ligno. Post la decido de Petro-la-Granda, la konstruo komenciĝis en la jaro mil sepcent tri. Poste oni anstataŭigis la lignon per ŝtonoj. La impona historio pri konstruaĵaro mortportas. Centopaj laboristoj devigitaj labori en teruraj kondiĉoj mortis pro ege peniga laboro sur tiu konstruejo. Multnombraj konspirantoj en ties prizonoj, estis por ĉiam kaptitaj kaj torturitaj. La unua malliberulo estis la propra filo de la Caro, li nomiĝis la Carevitĉo Alexis. Sur tiu fortreso staras la katedralo « Petro kaj Paŭlo ». Ĝiaj kolonoj el marmoro, ĝiaj brilantegaj kandelingoj, ĝiaj oritaj kaj skulptitaj ikonostazoj, ofertas belegan ornamaĵon al tomboj de anoj el la familio Romanov. Oni eniras en la fortreson tra la pordo Sankta-Petro. Supre estas skulptita la dukapa aglo. Fakte oni vidas nur du kapojn kvankam la skulptaĵo trikapas. Maleblas vidi tri (mistera ĉu ne ?)… pro la vidangulo… dank'al nia gvidis-





tino oni scias tion.

Piede de fortreso, sur la strando, vintre kiel somere, genaĝantoj banas sin. La klubo nomiĝas « la rosmaroj ». Vintre la banontoj rompas la glacion por reviglanta plonĝo.

Johano-Jakobo MORO

(sekvo de la vojaĝo sur venonta T.L.)

Vojaĝo en NEPALO

De la 25a de Februaro ĝis la 13a de Marto 2011

La ideo pri tiu vojaĝo ekis dum la lastaj Pluezekaj Renkontiĝoj en aŭgusto 2010. En tiuj renkontiĝoj partoprenis unu el la honoraj esperantistaj gastoj : Poshraj SUBEDI el Nepalo, invitita de Roger EON, eksprezidento de la Pluezeka klubo.

Poshraj bonege reklamis pri sia lando kaj la agadoj de la esperantista Nepala movado. Li informis nin pri la Internacia Himalaja Renkontiĝo kiu okazas ĉiun duan jaron ekde 1995 ; ĉijare ni partoprenis la 9an renkontiĝon en Nepalo.

La prezentado de la programo estis tre alloga ! Unue renkonti nepalajn kaj eksterlandajn esperantistojn, kaj due, malkovri la landon dum plejparte piedmarŝo. Kia revo ! Praktiki la Esperantan lingvon , konatiĝi kun lokaj kaj alilokaj esperantistoj kaj samtempe piediradi !

Je la fino de la Pluezekaj renkontiĝoj, ni tuj aliĝis al la 9a IHR !

Frue en septembro, ni mendis niajn flugbiletojn, kaj ni interkonsentis pagi la ceteran kotizon por la hoteloj surloke al NESPA (Nepala Esperanto Asocio). Alia klopodo estas vizo por eniri en Nepalon. Oni povas zorgi pri tio antaŭ la vojaĝo aŭ poste en la flughaveno Tribhuvan en Kathmandu. Ni elektis la unuan pere de la nepala konsulejo en Rouen.

En la sama aviadilo, ni estis kvin partprenantoj Michel kaj Françoise Dechy (Michel instruis en Pluezek pere de nova metodo « Tinĉjo en Tibeto », ili loĝas en la norda parto de Francio), Marie Savary, kiu zorgas pri la joga ateliero ankaŭ en Pluezek (ŝi loĝas en la sudokcidenta parto de Francio), kaj ni ambaŭ.

La aliaj francaj partoprenantoj estis Jean Claude kaj Hélène Dubois,(Jean Claude estas la nuna prezidento de la Pluezeka klubo), Michèle kaj Michèle, familio Monterrat el la regiono de Bourg en Bresse, kaj familio Castillon el la sudorienta parto de Francio. La franca grupo alvenis el diversaj regionoj : Bretonio, Norda regiono, Turanĝia regiono, Orienta , sudorienta kaj sudokcidenta francaj regionoj.

En tute 16 partoprenantoj el Francio. Ni estis la plej granda grupo. La aliaj estis 9 japanoj inter kiuj partoprenis HORI Jasuo. 2 svedanoj, 2 el Mongolio, kaj unu el Danlando : 30 eksterlandanoj.

Vendrede la 25an de februaro, ni forflugis vespere el CDG Parizo. Ni ne rekte atingis Kathmanduon. Estis halto en Doha, ĉar ni elektis « Qatar Airways », kiu estas la plej malmultekosta. **Ni surteriĝis en Tribhuvan Kathmandu je la 26-a posttagmeze.** Tie atendis nin Poshraj Subedi kaj Narendra. Ili varmege bonvenigis nin, kaj mendis taksiojn por atingi nian hotelon Marshyangdi en Thamel, turisma kaj komerca kvartalo de Kathmandu. Ni enhoteliĝis iom lacaj post la flugo, kiu daŭris 6 horojn kaj 15 minutojn inter Parizo kaj Doha, 4 horojn kaj kvaronon inter Doha kaj Kathmandu, plus tri hora halto en Doha flughaveno. Sufiĉas !

En la hotelo, ni renkontis la aliajn eksterlandajn kaj nepalajn partoprenantojn. Post vespermanĝo kaj eta promenado, ni reiris al la hotelo kaj restis en nia ĉambro. Je tia tropika latitudo noktiĝas ĉirkaŭ la 6a . Ekde la 7a estas nokto, la stratoj mallumiĝas. Nur la butikoj lumiĝas iomete per etaj lampoj. Necesas kunporti lampojn por promeni tra la urbo. Nokte ne estas elektro ĝis frumatene.

Dimanĉe, la 27a feb.

Matene ni vizitis tre fama stupao Budhanath,, Mondheredaĵo. (Vidu la artikolon el Vikipedio sube). Nia grupo estis fotita fronte al tiu loko.

Bodnath (ankaŭ nomata Bouddha) estas





unu el la plej sanktaj budhistaj lokoj en antaŭurbo de Katmanduo, Nepalo. La budhista stupao de Bodnath dominas la urban silueton. La antikva stupao estas unu el la plej grandaj de la mondo. La influo de grandaj grupoj da tibetaj rifuĝintoj el Ĉinio estas videbla pro la pli ol 50 tibetaj gompasoj (monaĥejoj) en la ĉirkaŭaĵo de Bodnath. Bodhath estas unu el 10 lokoj en Nepalo sur la listo de Mondheredaĵoj de UNESKO. Ĝi estas unu el la plej popularaj turistaj lokoj en la urbo Katmanduo.

Poste, antaŭ tagmanĝo, ĉar ĉiam la programo estas riĉa, laŭlonge rivero Bagmati, ni ankaŭ vizitis Pashupati. Surloke, ni vidis trans la rivero kremaciejojn, kiuj nomiĝas « Ghats ». La korpoj kovritaj per oranĝaj mortotukoj estas bruligitaj sur amaso da brulligno. Se la familio de la mortinto estas sufiĉe riĉa, ligno povas es-



ti santalo. Ni supreniris per ŝtuparoj en la arbaron, kie estas Shiva sanktejoj. Shadus (sanktuloj laŭ Hinduismo) loĝas en tiuj dometoj. Proksime al ghats, estas la Pashupatimath templo, unu el la plej famaj sanktulejoj en la mondo ambaŭ por Hinduistoj, kaj por Budistoj. Nur Hinduistoj povas eniri en tiun sanktejon, tamen tra la granda enirpordo, oni povas spekti kupran statuegon de Nandi, la virbovo de Shiva.

Posttagmeze, ni iris al Patano.

Lalitpur (लालितप) aŭ Patan (पातन) estas la kvara plej granda urbo de Nepalo post Katmanduo, Biratnagar kaj Pokhara. Ĝi situas en la valo de Katmanduo je la suda bordo de la Bagmati rivero en la distrikto Lalitpur kaj formas kun Katmanduo duoblourbon. Ĉirkaŭ la jaro 1000 ĝi estis kun proksimume 100 000 loĝantoj la deka plej granda urbo de la mondo. En 2001 la urbo havis 166 674 loĝantojn.

Ni vidis ci-tie la lokon Patan Durbar Parking Lot, la burgparkejon, Hiranya Varna Mahaa Vihar, la Templon de mil Budhoj Mahabuddha, kaj kvinetaĝan Pagodon Kumbeshwar Tempel.

Antaŭ vespermanĝo, okazis la interkonata renkontiĝo.

Estas tradicia rita programo : la partoprenantoj devas prezenti sin, eĉ la estraro de NESPA, ĉiu ricevis donacojn : belegan sakon brodita de la NESPA simbolo, kaj monujon ankaŭ brodita je la nomo de la partoprenanto. Finfine, ni trinkis glason da vino aŭ da fruktosuko . Estis agrabla kaj amikema interkonatiĝo.

Kia programo por nia unua tago en Kathmandu !

Lunde la 28a de februaro


Matene, ni vizitis la lokon Svayambhu Maha-

chaitya, naskiĝlokon de la Bajrayana tradicio. Tiu loko estas alnomita « simio templo » , ĉar estas multe da simioj tie ! La templo staras sur monteto, la stupao estis tre fama, Hergé desegnis ĝin kiel la « simbolon » de Katmanduo en « Tinĉjo en Tibeto » (paĝo 10). De tiu loko estas mirinda vidaĵo super Kathmandu :



Vikipedio : Laŭ legendo, la valofundo estis





kovrita de lago, la bodisatvo Manĝuŝri venis de Ĉinio kaj tranĉis la sudan monton por lasi la akvon elflui, kaj la monteto Swayambhu staris. Poste li kreis la unuan loĝantaron. De ĉirkaŭ 2,000 jaroj, la Nevaroj kreis propran civilizacion en la valo. Tiuj establis la dinastion Malla kaj kreis ties imponajn artaĵojn. Ĝis kiam la reĝo Prithvi Nārāja Shāha akiris ĝin en la jaro 1768, nur la Nevaroj loĝis tie kaj ilia lingvo estis la lingvo de la ŝtato. Poste malrapide venis migrantoj de aliaj etnoj kaj rasoj.

Nun la Nevaroj, indiĝenoj estas nur 33 elcentoj de la loĝantaro kaj aliaj homoj apartenas al aliaj malgrandaj etnoj. La registaro eĉ malpermesis uzadon de Nevara lingvo en registaraj oficejoj. Post kiam la registaro deklaris ke Nepalo estu Federacia Respubliko, la Nevaroj deziras ĝin nomi kiel Nevara Respublika Ŝtato.

Posttagmeze, ni vizitis Bhaktapur

Jen la artikolo el Vikipedio :

Bhaktapur (Nepale: भक्) estas post Katmanduo kaj Patano la tria kaj plej malgranda reĝourbo de la Katmandua valo en Nepalo. Ĝi situas 16 kilometrojn oriente de Katmanduo. Kiel Katmanduo, Bhaktapur situas je malnova komerca itinero al Tibeto, kio kunhelpis la riĉecon de la urbo. La dua piliero de la riĉeco de Bhaktapur estas la agrikulturo, kiu forte dominas la urban impreson, speciale dum la rikolta tempo. Tiel Bhaktapur karakterizas sin pro la granda nombro da agrikulturistoj, 60% de la loĝantoj de Bhaktapur apartenas al la agrikulturista Jyapu kasto.

Historio :



Bhaktapur estis la ĉefurbo de la Malla-Regno, kiu inter la 14-a jarcento kaj la dua duono de la 18-a jarcento ampleksis la tutan Katmanduan valon. Nuntempe multaj palacoj kaj temploj estis konstruitaj, kaj hodiaŭ ankoraŭ ili parte ekzistas. La granda influo de hindaj rifuĝintoj el la norda parto de Hindio kondukis al klara area disiĝo de la unuopaj kastoj interne de la urbo. Pro la bezono esti proksime de la sankta centro de la urbo (la Taleju Templo en la Palaco), oni konstruis 3-etaĝajn domojn por ŝpari lokon. La manko da spaco en la domoj kondukas al komuna uzo de stratoj kaj placoj. En la jaro 1768 Bhaktapur estis konkerita post akraj bataloj kun la trupoj de Prithvi Narayan Shahs.

Vindindaĵoj :

Por viziti la Durbar Placon kaj la malnovan urbon oni devas aĉeti bileton por 11 eŭroj je la okcidenta enirejo. Sufiĉe multekosta sed tamen valora. La Durbar Placo en Bhaktapur, la loko de la palaco de la Malla-regintoj, estas pro sia politika senvaloreco post la konkero de Prithvi Narayan Shah (1768) kiel ankaŭ pro la gravaj detruoj dum la tertremoj de 1934 malpli ornama ol la placoj en Katmanduo kaj Patano. Tamen tre vidinda, ĉar la Durbar Placo en Bhaktapur estas barita por aŭtotrafiko kaj krom tio kelkaj temploj estas rekonstruitaj. La palaco de la Malla-regintoj estas la plej malnova palaco en la valo de Katmanduo. Inter la palaco de la 55 fenestroj kaj la Malati Chowk en la okcidenta parto troviĝas la ora pordego, kiu konsistas el orumita kupro kaj estas impona ekzemplo de nepala manlaborarto. Oni povas vidi ĉi



tie la dekbrakan kaj kvarkapan Taleju, la patrondiino de la Malla-oj. La pordego estis en 1753 metita en la palacfronton fare de Ranajit Malla. Sudoriente de Durbar Placo situas la Taumadhi Placo kun la plej alta templo de la Katmandua valo, la Nyatapola-Templo. La 30 m alta templo estis konstruita dum la jaroj 1702-1708 fare de Bhupatindra Malla (1696 – 1722). Sudoriente de la Taumadhi Placo situas la Pujari Math, en kiu hodiaŭ troviĝas muzeo por manlaborarto. Ĝi estas precipe konata pro siaj riĉaj kaj ellaboritaj lignoskulptaĵoj sur pordoj kaj fenestroj. Tre impresa estas la pavofenestro en la strateto je la orienta flanko.

Dum nia promenado, el la plej rimarkindaj konstruaĵoj estis sendube la Nyatapola templo kun ĝiaj 5 etaĝoj. En stratetoj, estas multe da butikoj. Inter ili, ni preferis la paperbutikon fronte de la pavofenestro. En tiu butiko, ni vidis la fabrikadon de la nepala papero, kiu estas fabrikata el ŝelo de arbusto nomata "Lokta". Tiu fabrikado estas tradicie metiista laboro.



Jean-Louis kaj Denise Le Brizault
(Daŭrigo de la raporto sur venonta T. L.)

◆◆◆◆◆◆◆

Pensu al s-ro Royer

Ne estas kutimo mia laŭdi politikiston, male des pli ke ili ne montriĝas favoraj al Esperanto. Se hodiaŭ mi omaĝas al la ĵus mortinta eksurbestro de Tours, s-ro Royer, estas ĉar li estis la unua urbestro de Tours akceptinta favore nian peton.

Ĝis lia apero, ĉiuj respondeculoj de nia grupo petis ke strato estu dediĉita al d-ro Zamenhof. Ne unu urbestro, de kia ajn estu sia politika koloro respondis. Kiam mia edzino kaj mi vizitis sinjoron Royer kaj petis lian helpon por havi taŭgan sidejon (ĉar tiam ni ne havis), ankaŭ por la nacia kongreso de 1975 kun dume inaŭguro de Zamenhof strato, li honeste respondis al ni :"Mi ne kredas je la fina sukceso de Espéranto, sed mi helpos vin". Fakte li rilatigis nin kun la tiama direktorino de la socia centro de la kvartalo Sanitas, kie ni ricevis lokon por niaj kunvenoj kaj ŝrankojn. Dum la kongresa jaro ni suferis pro ekonomia krizo, kiu senigis nin je ĉiu ekstera helpo. Dum la kongresaj tagoj ni havis je nia dispono la tutan urbodomon por la diversaj aranĝoj, ni ricevis kartojn por ke la aŭtoposedantoj parku senpage, la metiista teamo estis je nia dispono por la dekoracioj kaj materialoj de la kunvenejoj, ni havis lokon por la solena inaŭguro de la Zamenhof-strato, estis ankaŭ honorvino ofertata de la urbo, k. t. p.. Fakto menciinda estas ke la direktorino de la socia centro de Sanitas, sen peto de mi, propravole pruntedonis al mi la ŝlosilojn de la centro por eventuala bezono de dokumentoj dum la kongreso. Tiun fidon ni ŝuldas certe al s-ro Royer.

Ni, esperantistoj ne forgesu, ke li estis la unua urbestro de Tours agnoskanta la meriton de d-ro Zamenhof.

André Aude

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr